72 ~~54~~ 5.

BIBLIOTEKO
# NOVA KULTURO



Petr Dânov

# La alta idealo

I-a jaro № 1

La lumo brilas en la mallumo, kaj la mallumo ĝin ne venkis

Burgas ~ Bulgarujo

BIBLIOTEKO „NOVA KULTURO“ — № 1

Petr Dânov

# LA ALTA IDEALO

Esperantigis: Dian

Burgas — Bulgarujo
1928



Petr Dânov

# LA NOVA KULTURO ALPROKSIMIĜAS!

La homo en sia regreso interrompis sian ligon kun Dio. La evoluo celas restarigi ĉi tiun ligon. La evoluado de la homaro marŝas konsekvence. De tempo al tempo sur la teron venas iu Granda Instruisto, kiu laŭ la grado de la homoj, laŭ ilia kulturo, moroj ktp. donas al ili metodon por ilia spirita elkreskiĝo kaj tiuj homoj, kiuj estas pretaj akcepti ĝin, progresas. Ĉi tiu metodo donita al la ceteraj homoj ĉiam estis profanita. Dume inter la homaro aperas nova regreso, venas nova Instruisto, kiu laŭ la nova grado de la homaro donas novan metodon, kaj Li metas la fundamenton de la nova kulturo. Tiel marŝis la evoluo de la homaro. La formoj ŝanĝiĝadis kaj nur la spirito restadis eterne unu kaj sama.

Kristo venis sur la teron dum momento de granda spirita regreso. Li venis vekigi la dormantan homaron kaj montri al ĝi la metodon por ĝia elkreskiĝo. Per sia vivo Li montris la vojon por la spirita perfektiĝo. Per tio Li montris, ke la vojo al perfektiĝo estas vojo de ofero pro amo. Antaŭ Kristo inter la hebreoj regis la principo „Timo de Dio“, Kristo donis novan principon: „Amo al Dio“; ĉar nur la amo povas suprenigi la homon kaj alproksimigi lin al Dio.

En la unua epoko de la kristismo la principoj de Kristo estis konservitaj. Sed pli poste la kristismo komencis iom post iom perdi la ideon de unu spirita movado kaj formiĝi kiel instituto konstruita laŭ la formo de la ceteraj institutoj. Aperis la nuntempa eklezio, kun sia hierarhia ordo, kun siaj ceremonioj, eksteraj formoj ktp. La spirito malaperis, restis nur la formo. Dum la mezepoko la kri-

stismo estis en plena regreso. Estante en la komenco impulso por la progreso de la homaro, en la mezepoko ĝi estiĝis embaraso por ĉi progreso. La mezepoka eklezio fariĝis disvastigilo de despotismo, de malklereco, de erarigo ktp. Sed la homaro devas evolui, ĝi ne povas reveni malantaŭen. La eklezio estiĝis por ĝi formo, deziranta ĝin enkatenigi. Aperis reakcio. Ĉiuj, kiuj sentis la eklezian ŝarĝon ekdeziris ĝin forigi. Kaj kiel rezulto de ĉi reakcio aperis la Ateismo. La aŭtoritato de la eklezio estis faligita, la homaro liberiĝis de unu granda ŝarĝo kaj ekspiris libere. Kaj en sia oli posta evoluo ĝi transpasis de unu ekstremo al alia. La ateismo pereigis la spiritan principon en la homo, kiu unika subtenas la altajn idealojn en la homa animo. La homoj estiĝis malmolkoraj, ili estiĝis ekstremaj egoistoj, materialistoj ktp. La ateismo estante en la komenco liberiga movado nun ĝi komencis fariĝi embaraso por la evoluo de la homaro. Kompreneble, kiel ĉiu embaraso ankaŭ ĉi tiu devas esti forigita, forigita de la vojo de evoluo. Tiel ni venas ĝis hodiaŭa tago.

Hodiaŭ religio, scienco kaj filozofio estas en regreso. Ĉie regas la formo kaj la spirito mankas. La kristana predikanto al kiu ajn eklezio aŭ socio li apartenas ripetas unujn kaj samajn frazojn per diversaj manieroj: ĉio ĉi estas moralaj konsiloj, kiuj estas ripetataj de jarcentoj: Estu bonaj, estu puraj, justaj, kredu ktp. Sed kiu estas la vojo per kiu oni povas atingi ĉi tion? Jen la ĉefa demando, al kiu neniu respondas, ĉar neniu scias. La nuntempa homaro perdis sian ĝustan vojon, hodiaŭ ĝi vagadas sen vojo kaj direkto. La demando estas kiu montros al ĝi la ĝustan vojon. La sola respondo estas, ke nur la okultismo estas unika kiu povas fari tion. Ĝi estas scienco de la profunda antikveco, ĝi estas trezorejo de ĉiuj sciencoj, akiritaj de ĉiuj progresintaj homaj animoj dum la pasintaj miljaroj. Ĉi tiu scienco estis gardita ĉiam en sekreto. Al ĝi povis alproksimiĝi nur la inda, nur la homo kun la plej alta moralo.

La instruo de Kristo, kiel ankaŭ la instruoj de ĉiuj Grandaj Instruistoj de la homaro estas instruoj okultaj. Ilia deveno estas unu kaj sama. La kaŭzoj por iaj eksteraj diferencoj estas en tio, ke tiuj Instruistoj venadis dum diversaj epokoj kaj konformigadis siajn instruojn al la grado de la homa evoluo.

La vera okulta scio ne estas skribita en libroj kiel la nuntempa. Ĝin oni transdonadis buŝe de Instruisto al Lernanto ktp. En la nuntempa okcidenteŭropa mondo ekzistas ia okulta literaturo, sed ĝi estas ekstera. Ĝi ampleksas nur maldrandajn fragmentojn de la vera okulta scienco kaj ili estas ŝanĝitaj kaj malvere transdonitaj. La kaŭzo de tio estas, ke en la okultismo eniris homoj nepretaj labori por ĉi celo. Kaj ĉi tiu malvera transdonado de la okultaj veroj kaŭzis la forĵeton de la okulta literaturo. Kaj kun la ĝenerala regreso malaperis ankaŭ la intereso al ĝi. Lastatempe por nia granda ĝojo, ni rimarkas, ke preskaŭ en la tuta mondo aperas spirita renesanco. Preskaŭ en ĉiuj popoloj ekiĝas spiritaj movadoj kiuj kun malgrandaj varioj kondukas al la sama celo: la spirita elkresko de la homo. Kun ĉi-tiu spirita revekiĝo nun denove aperas la intereso al la okultismo.

Kun la bulgara popolo okazas la sama afero kiel ankaŭ kun la ceteraj popoloj. Bulgarujo estas lando de unu malnova okulta tradicio. En la malproksima estinteco en ĝi estis aperinta forta okulta movado, nomata „Bogomilismo", kiu komencis larĝe disvastiĝi. Sed la adeptoj de ĉi-instruo ne trovis akcepton inter la bulgara popolo. Ili estis persekutataj, turmentataj kaj plej poste devigitaj forlasi Bulgarujon kaj iri inter la okcidenteŭropaj popoloj, kie ili tro multe helpis por ilia kultura evoluo. Dum ĉi tempo Bulgarujo enfalis sub kvincentjara turka jugo kaj tio kaŭzis la interrompon de la okulta tradicio.

Hodiaŭ la bulgara popolo estas denove libera. Dum unu mallonga periodo da tempo ĝi faris grandan progreson en sia spirita kaj kultura evoluo. La intereso al ĉio spirita en ĝi pli kaj pli kreskas. Pres-

kaŭ ĉiuj okcidenteŭropaj kulturaj kaj spiritaj movadoj trovas en ĝi eĥon. Sed tio, kion la bulgara popolo en la nuna tempo donas kiel tre originalan, ĝi estas la tiel nomata socio: B l a n k a F r a t a r o. Tio estas okulta movado en Bulgarujo, kiu ampleksas homoj de preskaŭ ĉiuj klasoj de la popolo. La fondinto de ĉi socio estas la Majstro Petro Dânov. Li laboras inter la bulgara popolo de pli ol 25 jaroj, legante senĉese siajn lekciojn en speciale aranĝitaj por ĉi-celo kunvenoj en Sofio. Lia instruo estas nova. Ĝi estas fondita sur la principoj de la vera kristanismo. Ĝi ampleksas la tutan homan vivon en ĉiuj ĝiaj branĉoj. La unikan vojon por la restarigo de la homaro ĉi-Instruisto vidas en la elkresko de la individuo. Do, Li en siaj lekcioj ĉiuflanke eksploras la homan animon en ĉiuj ĝiaj rivelacioj. En la samaj lekcioj Li elmontras la leĝojn, kiuj direktas la spiritan vivon kaj donas metodon por la regula evoluado de la animo. Laŭ Li en la fundamento de ĉi-evoluo staras kvin principoj: Saĝo, Amo, Vero, Justo kaj Virto. La saĝo portas en la homan menson la Lumon, la Amo — portas en la homan koron la varmon kaj la Vero — la Liberon. Sed la ĉefa fundamento sur kiu estas bazita Lia instruo estas la Amo en ĝia plej alta formo.

La homaron en ĝia regreso gvidis la Saĝeco. La homaro malrapide enfaladis en la materion, por ke ĝin ekkoni kaj akiri saĝecon. Tiamaniere ĝi malproksimiĝadis de Dio. Hodiaŭ la homaro estas en la lasta momento de sia regreso. De nun ĝi devas evolui . . . De nun la evoluo de la homa animo estas gvidota de la Amo. Nur per la Amo al Dio oni povos denove reveni al Dio.

La evoluo de la menso en la okcidenteŭropaj popoloj multe superis la evoluon de la koro. La lasta restis malantaŭe. Tio kaŭzis grandan disharmonion. La troa evoluo de la menso alportis en tiuj popoloj krudecon. Ili estiĝis homoj ŝtonkoraj, egoistoj, ateistoj, materialistoj ktp.

La nova kulturo, kiu nun venas estas kulturo de

la homa koro, kulturo de la Amo. La instruo de la Majstro P. Danov manifestas sin, nome, kiel portanto de ĉi-amo. En ĉi tiu direkto Li laboradas kaj kiel ekzemplon ĉi-tie ni donas unu el Liaj lekcioj, nome „La Alta Idealo". Kiel ĉiuj Liaj lekcioj ankaŭ ĉi-tiu estas simbola. En ĝi Li priskribas, Li desegnas la altan idealon de la homo de la nova kulturo.

Estas rimarkeble en bulgara popolo, kiel ankaŭ en ĉiuj aliaj popoloj, ke alproksimiĝas, ke efektiviĝas unu spirita revekiĝo, unu spirita renesanco. Hodiaŭ ni vivas sur la limo de du kulturoj. De unu flanko — la kulturo de la senkredeco, ekstrema egoismo, mensogo, malico ktp. Ĝi jam estas en sia fino. De la alia flanko estas rimarkeblaj la unuaj radioj de la aperanta nova kulturo. Ĝi estos kulturo de la Amo, de la Kredo, de paco kaj frateco inter la popoloj, inter la homoj.

La malnova kulturo foriras tiel, kiel foriras la nokto por cedi sian lokon al la tago. La egoismo, malico kaj malamo fandiĝos, kiel la glacio degelas sub la unuaj radioj de la printempa suno. La vintro de la vivo foriros kaj venos nova printempo, kiu varmigos ĉiun homan koron, kiu lumigos ĉiun homan menson. Ĉi-tio estos printempo por la homaj animoj, kiuj ĝin atendas dum longaj jarcentoj. Ni pretiĝu ĝin renkonti!

Ni, la okultistoj en Bulgarujo observas kun granda intereso la evoluon de la okulta movado en la okcidenteŭropaj popoloj. Ni ĝojas pri la sukceso ankaŭ de ĉiu spirita movado, ne grave kian karakteron ĝi havas.

Cetere, jam venis la tago, en kiu ĉiuj adeptoj de la okultismo de oriento kaj okcidento, ĉiuj homoj, kiuj laboras por la spirita progreso de la homaro, sendiference al kiu socio ili apartenas, devas mano en mano komenci komunan laboron por la venigo de ĉi granda majesta tago, la tago de la Regno de Kristo — La Granda Sinjoro de la homaro, la tago de la Ĉiela Regno sur la tero.

D-ro K. N. Paskalev

Burgas, Septembro 1927.

# ANTAŬPAROLO

Vidante por unua fojo la Majstron Dânov, Li aspektas maljuna, kun griza, preskaŭ blanka hararo, kiu kuniĝas kun lia neĝblanka barbo. Mildaj brunaj okuloj, kun rigardo profunde penetrema, rigardas kviete elsub grizaj brovoj. Lia frunto estas esprimo de Lia penso. Korekta belforma nazo, malfermas delikatajn naztruojn. Oni dirus, ke ĉi-tiu vivigita spirita figuro iam estis kiel modelo por la bronza Homère, gardata tie en la Florentina muzeo inter la plej famaj verkaĵoj.

Kiam Li parolas la maljunulo malaperas. La muziko de Lia parolo, jen vigla malsupren venanta de la majestaj montpintoj, jen disverŝas sin kviete sur la ebenaĵojn, forportante sur la flugiloj de sia simfonio la lolon de la malbono. Kie vi estas sufero, ĉagreno, mizero, maljuneco, morto? Apenaŭ pasis kelke da minutoj de kiam Li ekparolis vi jam flugas ien trans la spaco kaj tempo en la sfero de via animo.

Kaj jen, Li eksilentas. Malsupreniras de la katedro homo mezstatura, kun harmoniaj movoj. Kaj jen apud vi simplete Li ekstaras, ekstaras en malhelblua, griza aŭ blanka vestaĵo. Vi vin demandas: Ĉu Li estas? Ĉu tiu estas Li, la Majstro?

Jam kelke da disĉiploj Lin postsekvas ĝis Lia modesta blanka dometo, kun bela ĝardeno, ornamita per skarlataj rozoj kaj abeluloj.

Viroj, virinoj, maljunaj, riĉaj kaj malriĉaj el ĉiuj klasoj — Liaj disĉiploj senĉese vizitadas Lian Domon, unuj atingas nur la sojlon kaj ricevinte tie silente respondon al ĉiuj siaj demandoj kontente ili hejmen revenas. Aliaj, pli kuraĝaj, atendas sian vicon kaj jam enirinte ili forgesas kial ili venis, forlasinte malproksime, malantaŭ si la bagatelajn de-

mandojn, kiuj ilin turmentadis hejme tage kaj nokte. Tie, transportitaj en alia mondo la demandoj unu post alia defalas, ĉiuj ili jam estas solvitaj. Ili estas super ĉi pensoj ilin turmentintaj hejme.

La Majstro kuracas la korpon per la spirito. Li rekomendas plej multe la frumatenajn sunradiojn kaj la puran vegetaran nutraĵon. Similan oni vidas ankaŭ sur Lia manĝotablo, ĉirkaŭ kiu ĉiam estas gastoj, venintaj de proksime kaj malproksime. Posttagmeze Li interparolas kun ili, demandas ilin pri ilia vivo aŭ ilin instruas. Kiam Li estas sola en sia ĉambro ofte Li ludas violonon kaj iam ankaŭ kantas. Ofte tion Li faras ankaŭ antaŭ siaj gelernantoj.

Ĉiam vigla, La Majstro ŝatas la ekskursojn kaj dum ĉiu tempo kondukas siajn gelernantojn sur la montojn. Vintre ili vizitadas Vitoŝon kaj somere unu fojo dum la jaro Musal'on (la plej alta montpinto de la monto Rilo en la Balkana duoninsulo — pli ol 3000 m.) Per ĉi-tiuj oftaj ekskursoj kaj per la profunda spirado de la pura aero, la malfortaj plifortiĝas, la malsanaj resaniĝas, la muskoloj de la maljunaj plifortiĝas kaj ili plijuniĝas.

Proksime ekster Sofio la Frataro, sur unu altaĵo, havas sian ĝardenon, ĉirkaŭita de tri flankoj per pinarboj, de kie sin malkovras majesta vidindaĵo, kontraŭ la montoj: Vitoŝo, Rilo kaj Ljulino. En ĝi estas konstruitaj multe da malgrandaj dometoj en kiuj loĝas la gelernantoj dum la pligranda parto de la jaro. Sola la Majstro havas tie similan dometon, kie Li loĝas estante tie. Ĉirkaŭe la grenkampoj estas lulataj en siaj sonĝoj. Dum la tuta printempo tien iras antaŭ la sunapero ĉiuj gelernantoj preĝi. Ili faras tie ritmajn ekzercojn, kantas siajn kantojn, kantojn de la skolo, ludas violonon aŭ aliajn instrumentojn, fosas la jam kulturita tero, plantita per diversaj kreskaĵoj, akvumas la bedojn, kelkiuj sidas kontraŭ la suno, legas, lernas, pentras. Iuj kantoj estas komponitaj rekte de la Majstro kiel modeloj kaj la aliaj de la lernantoj muzikistoj laŭ ĉi-tiuj modeloj. Iuj de ĉi-kantoj-modeloj estas do-

nitaj de la Majstro en iuj antikvaj lingvoj. Iuj de la lernantoj — muzikistoj, poetoj, pentristoj prilaboras iujn el Liaj ideojn en muziko, versaĵoj aŭ bildoj. Li ofte trapasas multe da tempo inter siaj lernantoj, kiel iam Sokrat. Oni Lin demandas, Li respondas. La Majstro agordas la animojn, forportante ilin sur la flugiloj de sia amo en pli superajn sferojn. Li estas demandata pri multe da aferoj, oni donas al Li multe da demandoj, al kiuj Li respondas edife. Ĉiuj en la Frataro estas avidaj por scioj kaj Lumo.

Krom la dimanĉaj lekcioj unu fojo dum la semajno okazas komuna okulta klaso kaj ankaŭ unu alia pli speciala por gejunuloj, precipe gestudentoj kaj gelernantoj el la lernejoj. La unuajn la Majstro instruas utili la sperton, sian sperton, por la bono, la aliajn instruas utili la sperton de la unuaj, sen ĝin ripeti kaj tiel antaŭen marŝi. Ne estas maloftaj la okazoj kiam maljunaj homoj en ĉi-okulta klaso lernas legi kaj skribi.

La Majstro ne serĉas famecon, ne serĉas popularecon. Kaj malgraŭ tio la nombro de Liaj disĉiploj estas granda, nur en Bulgarujo pli ol 40,000. Sed ne nur en Bulgarujo. Estas sufiĉe multe da Liaj disĉiploj ankaŭ en Ameriko kaj alie.

Jen iuj el Liaj maksimoj:

Ellernu unue la homan animon kaj tiam eniru en la Dia skolo.

Forĵetu la egoismon. Suferas la kateĥumeno, ekzamenita estas la kredanto kaj la disĉiplo ĉiam kaj ĉie lernas.

Kiam vi neos de vi, vi trovos vian „Mi'o". Kiam vi ekamos Dion, vi trovos vian „Mi'o". Nur kiam vi kuniĝos kun la kosma Amo, vi komprenos la sekreton de la sekretoj, la veran poezion kaj la veran pentroarton. De la amo devenas la Vivo, de la Saĝeco — la Lumo kaj de la Vero — la Libero.

La suno estas la plej bona kuracisto kaj instruisto. Elradiumu ankaŭ vi ĉien radiojn. — La universo estas unu tuto. Eĉ la besto estas via frato. — Ne men-

sogu, estu kuraĝa, ne mortigu, kredu. — La animo, elirinta pura de la Kreinto, post sia vagado, ekstaros tute nuda, nur kun siaj virtoj, antaŭ Dio. — Lernu de la Naturo. — Estu fidela al Dio, al si mem kaj al la proksimuloj. — Kredu nur tion, kion vi elprovis. — Nenio estas kaŝita. — La vivon oni devas plibonigi unue interne, en la homo kaj poste ekstere.

La certeco de la vivo staras en tio, ke ni estu en ĉiama interligo kun Dio.

La scio por la kontakto kun Dio, por servado al Dio, estas scio por la Virtoj. — Ekster Dio estas kreata la peko. Nur en Dio ne estas tentoj, sed estas pureco, estas instruo, elkresko kaj evoluo.

Tiele parolas la Saĝulo, la revoluciulo, la Majstro de la nova vivo — Petro Dânov, Kiun la adeptoj de la rutino malamas, Kiun Liaj disĉiploj, la homoj de la nova vivo, adoras.

Mara Belĉeva

Ĉiu Instruo estas vera tiam, kiam ĝi povas malkovri al ni la Dian Mondon laŭ ĝia formo, enhavo kaj senco.

La Majstro

# La Alta Idealo

La naturo amas nur tiujn, kiuj havas altan idealon. Ĝi nomas ilin siaj plej amataj infanoj kaj ilin konas laŭnome. Sed tiuj, kiuj havas nenian idealon, ili ne estas enskribitaj en ĝia libro. Ili estas netaŭgaj, lasitaj en ĝiaj keloj por malproksimaj tagoj, por malproksimaj tempoj.

Jen pro kio, se vi iam eksentas, ke neniu priatentas vin, kvazaŭ vi estas forlasitaj de Dio, de la Naturo, vi sciu, ke la eraro estas en vi, vi ne havas altan idealon. Tio-ĉi estas leĝo, tio-ĉi estas regulo. Tiele estas, alie ne povas esti. Sekve ĉiu el vi povas plibonigi sian vivon, sian malfeliĉon, kaj ĉiu eliros el ĉi-tiu forgesita kelo. Eĉ iu el la plej forgesitaj en la fundo de ĉi-kelo, se iam kreos por si altan idealon, li komencos rampi kiel heliko kaj ne pasos multe da tempo, li troviĝos super la supraĵo. Kaj la Naturo diros: „Jen unu el miaj infanoj, kiu reviviĝis".

Kio estas la morto en la mondo? — La morto, tio estas la malfeliĉo de la forgesitaj infanoj, de la infanoj sen idealo. *La reviviĝo, tio estas la infanoj kun la alta idealo*, kiuj eliras el la fundo de ĉi tiuj forgesitaj keloj de la materia mondo. Nun, por elmontri vin aŭ elrampi el simila kelo, estas postulata volo, potenca kredo, kiu kun nenio povas esti komparata.

En la mondo estas homoj kiuj diras: Mi min vestas per kiu ajn, mi manĝas kion ajn, mi ĉion manĝas. Ne estas tiel. Homo, kiu diras, ke li manĝas ĉion, estas homo kun malalta idealo. Li estas ĉionmanĝanta besto. Tiu, kiu manĝas, devas manĝi plej zorge elektitajn nutraĵojn de la naturo, kiuj efikas plej bone. Nenion plu! Kiu ajn estu el vi, la

naturo ekkonos lin. Kiel ĝi ekkonos lin? Ĉiutage ĝi faradas siajn ekzamenojn. Kaj ĉu vi scias, kiajn bonegajn ekzamenojn ĝi faras? Ĝi, por elprovi kion vi kaŝas en vi mem, kiajn impulsojn vi havas kaj kio povas estiĝi de vi, ĝi kreas en sia ĝardeno plej belajn fruktodonajn arbojn kaj ornamas ilin per fruktoj de diversaj kvalitoj. Ĝi permesos al vi eniri en ĉi-ĝardenon kaj atentos kiun frukton vi deŝiros. Se vi havas altan idealon kaj se vi povas trovi la plej belan frukton, ĝi diros: „Jen unu mia saĝa infano“ kaj tuj ĝi notos en sia libro: „El vi homo povas estiĝi“. Se vi rezignos supreniri, ĝi havos alian opinion pri vi. Nun, tiu ĉi frukto de la arbo devas esti la plej bona. Ĝia forŝiro povas kosti al vi vian vivon, sed se vi supreniros kaj deŝiros ĝin, la Naturo diros: „Kuraĝa estas tiu-ĉi infano, ĉar ĝi prenis la plej bonan frukton“. Sed se vi suprenekrigardus kaj al si dirus: „Ha, kiu nun supreniros“, kaj ekrigardas malsupren, observante, ĉu ne estas falinta iu piro kaj poste eketendas la manon por deŝiri de la proksimaj branĉoj, ĝi diros: „Tiu-ĉi estas unu el la forgesitaj infanoj, de kiu homo ne estiĝos.“ Nun, ĉiuj bone rimarku: la Naturo observas nur viajn internajn impulsojn. Ĝi nur konstatas la faktojn, nur ilin observas kaj laŭ la rezulto de la observado ĝi prenas notojn. Sekve, se ĝi estas notinta ion plej bonan, kaŭzo por ĉi noto estas vi mem. Kaj se la Naturo kronikis ion, kio vin ne rekomendas, la kaŭzo estas ankaŭ vi. Ĝi estas ennotinta nek pli, nek malpli. Simple ĝi notis la fakton kaj laŭ ĉi-fakto ĝi faras sian konkludon. Sed kiuj estas ĉi konkludoj, kiuj efikos al via vivo? Ili estas via elekto, kiun vi faris.

Mi donos al vi unu malgrandan ekzemplon por klarigo de ĉi ideo, pri unu egiptanino, kiu estas nomita Eltamar'o. Ŝi estis filino de la plej malriĉa egipta vilaĝano, sed ŝi estis tre saĝa kaj inteligenta, virta kaj tre modesta. Kiam ŝi komencis studi en la lernejo, la instruisto demandis ŝin: Ĉu vi edzini-

ĝos aŭ virgulino vi restos? Ŝi respondis: Mi havas nur unu idealon sur la tero. Mi decidis jen tiel: nur al reĝido mi volas edziniĝi. Kiu ajn alia estu, se ne estas la reĝido, mi rifuzos al li. Unu elekton mi havas, sed se ĝi ne efektiviĝos, mi decidis resti virgulino. Vi diros: Ha, malsaĝa afero! Ne, idealon ŝi havas. „Se venos reĝido, mi eziniĝos, se ne venos, nenian edziĝon mi bezonas."

Kie estas nun la apliko de ĉi-tiu alta idealo en la mondo? Se vi havas kredon, instruon, unu mezuron, unu formon, se vi havas koron, animon, spiriton, ĉi-tiu spirito estu la filo de la Vero.

Nun mi alpaŝos al la komparo. Vi iras renkonti la aperantan sunon. Ne iru renkonti ĝin, kiam ĝi jam estas leviĝinta unu manplaton super la horizonto. Vi devas ĉeesti la aperon de la unua radio, kiu montriĝos. Ĝi estas la plej grava. Ĝi estas la reĝa filo. Se vi ne estas tie, la aliaj ne valoras. Se vi ne vidas la unuan radion, vi jam perdis la sunaperon. Ĝin kaptu, la aliajn vi ne bezonas. Prenu ĝin kaj revenu hejmen. Nun iuj demandas: Ĉu vi iris renkonti la sunaperon? — Jes, mi iris. Mi vidis kiel leviĝis la suno. Mi diras: Vi ne estas vidinta la unuan radion. La ceteraj radioj estas lastaj fruktoj de ĉi-tiu granda arbo. El vi homo ne estiĝos.

Se vi supreniras la monton, ne diru: „Mi trinkas akvon kian ajn". Ne, se vi trovos la plej bonan fonton, kaj se vi iros trinki de la centro, kie troviĝas la plej pura akvo, vi estas homo kun alta idealo. Se vi iras al la rando kaj diras: „Ankaŭ de ĉi tie mi povas trinki", vi havas malaltan idealon. Iuj el vi diros: „Mi povas ankaŭ de ĉi tie trinki". Ne, ĉi-tio ne estas karaktero. La disĉiplo de la okulta skolo devas distingiĝi de la aliaj. Se vi iros tien, apud la fonto, malgraŭ ke ekzistas malhelpoj, vi trinkos de la centro. Kiu ajn estu, li prenos de la plej pura akvo. Jam idealon vi havas.

Se vi supreniros iun montpinton, ankaŭ la sama

leĝo validas. Iu diros: Kien ajn mi povas supreniri. Ne, sur ĉi tiu pinto vi trovos la plej bonan kaj la plej belan lokon, por ke ĝi forte impresu vian animon. Kaj kiam vi malsupreniros, vi devas porti ĉi tiun pinton en via koro, kiel vivan pinton. Se vi legas librojn, la sama leĝo estas. Tralegu la librojn de la plej eminenta verkisto, de la plej eminenta filozofo, de la plej eminenta predikanto.

Se vi iras vidi iujn bildojn, iru kaj trarigardu tiujn de la plej eminenta pentristo, sed ne la bildojn de duagrada pentristo — nur tiujn de la plej eminenta. Sed la ordinarajn bildojn vi vidos kiam vi observas la homojn: kiu kiam manĝas . . . Ilin observante, vi vidos la ordínarajn bildojn. Sed farante elekton, vi iru vidi nur unu bildon. La unua bildo en la mondo estas sufiĉa.

Kiam vi elektas amikon — la sama leĝo. Elektu la plej noblan, la plej saĝan, la plej inteligentan, la plej bonan, kun la plej sincera koro. Se viro elektas edzinon — la sama leĝo; se virino elektas edzon — la sama leĝo. Ne cedu de ĉi tiu regulo! Cedado de ĝi venigas milojn da suferoj en ĉi tiun mondon. Nun mi parolas idee pri ĉio, pri la principoj, kiujn vi devas apliki ĉiutage. Iutempe vi diros, ke via idealo estas malprava. Bone. Nun ĝi estas malprava, sed por la venonta momento, kian idealon vi elektos? Ni supozu, ke hodiaŭ vi perdis la tagon — vi ne renkontis la unuan radion. Sed morgaŭ vi denove devas ĝin renkonti. Se vi ĝin renkontus sammaniere, vi denove perdus la tagon. Tamen se hodiaŭ vi havis bonan konduton kaj renkontis la unuan radion, vi ankaŭ morgaŭ renkontos ĝin. Tiamaniere via tuta vivo ŝanĝiĝos.

Kiam ni alpaŝos korekti nian vivon, denove la sama leĝo. Se vi volas korekti vian vivon, kaptu la plej grandan eraron, ne okupiĝu per la malgrandaj. Kaptu tiun, la plej grandan eraron, tenu ĝin tagon, du, tri, semajnon, monaton, jaron, 10 jarojn kaj plej poste ĝi scios, ke homo estas antaŭ ĝi. Kaj ĝi diros al si: „Mi kapitulacas. Vi meritas esti en ĉi tiu stato, en kiu vi troviĝas“.

Iu diras: Mi povas ami kiun ajn. Ne, vi ne parolas la veron. Mi dezirus, ke unu el vi diru al mi, ke li povas ami kiun ajn. Ne nur tiel vi devas paroli. Ni devas meti la amon al unu interna elprovo. Kiam vi eldiros la vorton „Amo" en ĝia plena senco, ĝi havas sian enhavon. Kia estas la enhavo de la Amo?

En la mondo ni povas ami nur Dion, nenion plu. Ĉi tio estas la granda vero! La granda vero estas tie. Kaj el tiu persono, kiu ne komencas per Dio, homo ne estiĝos. Se miaj vortoj ne estas pravaj, tralegu la tutan homan historion kaj trovu iun, kiu aginte alimaniere, sukcesis estiĝi homo.

Ĉiuj eminentuloj, ĉiuj sanktuloj, geniuloj, Instruistoj de la homaro estis homoj, kiuj amis nur Dion. Nun iuj kontraŭdiras: Se tia estas la Instruo, ni forgesos la homojn. Ne, ni ne forgesos ilin, ni donos al la homaro altan Idealon. Se ĉiuj celus la unuan sunradion, se ĉiuj celus la idealon de la Dia Amo, kia estus la nuna mondo, kaj nunaj viaj animoj. Ĉu ili estus tiel kriplaj? Ne. — Bone. Mi kontraŭdiros al ĉiuj, kiuj parolas, ke ili povas ami kiun ajn, ke ili povas ami la homaron. Mi diras: bone, por ke vi amu la homaron, vi devas koni la homon. Do, se vi amas la homaron, vi konas la homojn, kaj konante la homojn, vi povas forigi iliajn erarojn. Mi vin demandas: vi havas edzinon, kiu estas membro de la homaro, sed vi ne povas bone vivi kun ŝi. Kial? Vi havas filinon kaj vi ne interkompreniĝas. Vi devas ami vin reciproke. Vi havas filinon, vi devas esti en konkordo. De kie vi konas vian filinon? Sekve, via aserto, ke vi povas ami ĉiujn estas mensoga. Mi jam diris: vi povas ami la homaron, se vi konas la homon. La kono de kiu ajn estu el vi, konsistas el via Amo al Dio. En la plenumo de la Dia volo, en via Amo al Li, sin kaŝas la feliĉo. Tiel ni konkludas. Vi diras: ĝi estas facila, mia koro ardas, mi mortas por vi. Jes, jes, vi vivas en la amo, kiu mortigas la homojn. Ĉi tio ne estas amo, ĉi tio estas morto, ĉi tio estas abomenaĵo. Ĉi tio estas la amo de la nigra lumo, kiu

putrigas kaj malbonodorigas, makuligas, malvirtigas, malheligas la homan animon. En Dio estas unu granda atributo. Dio amas en ni la plej grandan bonon. En la Sankta Skribo vi trovas ĉi tiun verson: „Dio amas la veron en la homo". La plej alta, la plej pura en ni, jen kion Dio amas. Iu volas scii, ĉu Dio interesiĝas pri lia vivo. Pri via vivo povas interesiĝi multe da homoj, sed ne Dio. Se mi estas servisto ĉe iu fama sinjoro, kaj se mi disponas kun 10 aliaj servistoj por helpi min je mia vestiĝo, ĉu ankaŭ la sinjoro venos fari la samon? Ĉu estos saĝe? Ne. Li ne interesiĝas pri mia vestiĝo, li diros: Estas 10 servistoj kiuj helpu al li. La sinjoro ankaŭ ne interesiĝos kiu cirumis viajn ŝuojn. Kial? Estas multe da cirumistoj, kiuj estas pretaj kontraŭ pago cirumi viajn ŝuojn. Iu demandas: ĉu Dio hodiaŭ estas kontenta pri miaj ŝuoj? Pro kio Dio estu kontenta pri viaj ŝuoj? Dio povas esti kontenta pri tiu cirumisto, kiu havis kiel idealon cirumi plej bone la ŝuojn de la unua homo, kiu iros ĉe li. Kaj poste vi demandas: ĉu Dio interisiĝas pri miaj ŝuoj. Ne. Pri la cirumisto Li interesiĝas, ĉar ideon li havis...

Nun mi parolos al vi pri unu idealo. Se iu edzino kudras ĉemizon por sia edzo kaj aĉetas tolon kian ajn, kaj finkudras ĝin fuŝe, ŝi ne estas bona edzino. Ne, ŝi devas trairi la tutan urbon kaj trovi la plej bonan, subtilan, silkan tolon aŭ plej fortan linan, por kudri al li ĉemizon, dirante al si: Nun mi kudros al li ĉemizon por ke li ĝin memoru. Ŝi devas enmeti sian tutan arton. Ĉi tiu estas virino kun idealo. Se la edzo iras aĉeti ŝtofon por sia edzino, denove la sama leĝo. Ke li aĉetu ne ian katunon, por poste diri: Sufiĉe estas por ŝi, ja malfacilaj tempoj estas. Li ne estas bona edzo. Li devas trairi la tutan urbon, por aĉeti la plej belan ŝtofon, ke ne estu trovebla simila je ĝi. Ĉi tio devas esti lia idealo. Tiun tagon la Naturo enskribas por la geedzoj, ke ili faris la plej bonan elekton. Firman karakteron ili havas.

Se vi elektas libron por via amiko, elektu al li la plej belan kaj donacu ĝin al li, kiel rememorigo.

Se iu via amiko donos al vi sian albumon, por ke vi skribu al li rememoraĵon, skribu al li ion plej belan, kion vi posedas. Tiam la Naturo enskribos: El ĉi tiu infano homo estiĝos. Poste vi amas iun, ĉu ne? Iu diras: Mi amas mian amikon. Kial? Ja, li havas tiel belajn okulojn, tiel ardajn; tiel belajn brovojn. Li ne komprenas bone la Amon, malaltan idealon li havas. Al alia plaĉas lian nazon, lian buŝon, liajn lipharojn. Ĉiuj ĉi havas malaltan idealon. Laŭ ĉi tio oni povas konkludi kian amon ili havas. Vi trovos en via amiko tiun econ, kiu lin distingas de la aliaj. Vi diros: En li estas unu trajto, kiun la aliaj ne posedas. Ĝi, ĉi trajto ne estas eksteraĵa. Ĝi estas nek en la okuloj, nek en lia nazo, nek en lia buŝo, sed staras sur la plej alta loko inter ĉi-tiuj branĉoj. Kaj trovinte ĉi-trajton vi deŝiros ĝin kaj tenos ĝin en via animo, enskribos ĝin en via memoro, kal la Naturo skribos denove: El ĉi tiu infano homo estiĝos.

Instruiston vi havas, kaj vi diras: Nia Instruisto estas tre klera homo: Li sperte konas ĥemion, fizikon, astronomion, filozofion, Li multe scias. Ne, ĉi tio estas ŝarĝita kamelo, ĉi tiu ne estas via Instruisto... Ne estas la scioj, kiuj distingas vian Instruiston. Ĉi tio estas rubandoj, ornamaĵoj, sed kie estas la ĉapelo? Kaj ĉu vi scias kiel oni ŝanĝas la idealojn? La Instruisto diras al sia lernantino, ke ŝi devas aĉeti por si ĉapelon, sed sen rubandoj. Ŝi iras aĉeti ĝin, sed la ĉapelvendistino ekadmonas ŝin: „Li, via Instruisto tiel diris, sed ne povas esti sen rubandoj. Se ni metos unu rubandeton, la ĉapelo aspektos pli bele". Bone. Kaj oni metas rubandon. Sed tie estas aliaj ĉeestantoj. Ili diras: „Se oni metos rubandon ankaŭ sur la alia flanko, la ĉapelo aspektos ankoraŭ pli bele." Kaj ŝi diras: Ankaŭ al mi tiel ŝajnas, eble la Instruisto estos pli kontenta. Ĉu vi pensas, ke la ĉapelo nun estiĝis pli valora? Ne, ĝi senvaloriĝis. Mi pruvu al vi kiel ĝi senvalorigis. Prezentu al vi, ke mia Instruisto donas al mi belan plumon, per kiu oni povas skribi bonege. Sed venas iu el miaj amikoj, kiu diras: Atentu, mi havas unu juve-

lon, grandan kiel kokinovo kaj se ni metos ĝin je la pinto de la plumo, ĝi estiĝos pli bela.

Jen tiel per ĉeneto. Mi skribas. Venas alia, kiu diras: Ankaŭ mi posedas unu diamanton, grandan kiel anserovo, ke mi metu ĝin supre, ankoraŭ pli bele estiĝos. Nu, metu ĝin. Mi demandas: ĉu ĉi-tiu verkisto povos skribi bone per ĉi-tiuj juveloj? Ne, ĉi-tio estas la malsaĝaj idealoj de la nuntempa homaro, de la nuntempaj lernantoj, de la nuntempaj religiuloj, kiuj ne komprenas la grandan Dian fajreron, kiu devas trapenetri profunde niajn animojn.

Iam vi diras: Ke estu iu kiu alkroĉu al mi unu diamanton. Bone, se mi ekvolos alkroĉi al iu unu diamanton, mi devas trovi la plej grandan en la mondo. Se mi trovos tian, mi alkroĉos ĝin, se mi ĝin ne trovos, nenian diamanton mi alkroĉos. Tia devas esti ankaŭ via idealo: l a p l e j g r a n d a b e l a ĵ o e n l a m o n d o. Nome, laŭ tiu ĉi interna idealo vi distingiĝos de la ceteraj homoj.

Ĉu vi nun komprenas mian penson? Ĉu vi sentas kien fluas ĉi rivero? Delonge mi ne parolis al vi. Ĉi tiun vesperon mi decidis, mi diris al mi: ĉi tiun vesperon mi parolos al miaj lernantoj, mi parolos al ili plej bele, pri la plej granda belaĵo, kiu povas esti donita al ili. Se vi povis kapti la unuan radion, kiu eliris de Dio, el vi lernantoj kaj homoj estiĝos. Se vi estas malfruiĝintaj kaj se vi ne kaptis la unuan radion, mi diros al vi, miaj lernantoj, maldolĉan vorton: vi estas la forgesitaj infanoj en la fundo de ĉi tiu kelo.

La amanta parolas pri la amo, kaj la timemulo pri la timo. Kiu gajnas en la mondo? Ĉu tiu, kiu parolas pri la Amo, aŭ tiu, kiu parolas pri la timo? La saĝa homo parolas pri la saĝeco kaj la malsaĝa pri la bagatelaĵoj en la mondo. Kiu el ĉi tiuj gajnas. La saĝa homo konstruas kaj la malsaga malkonstruas.

Kaj tiel, ĉiuj progresintaj estaĵoj, ĉiuj fratoj de la Universala Blanka Skolo estas pasintaj ĉi tiun vojon. Ili ĉiuj havis grandan idealon. Ili ĉiuj tiel pensis. Kaj kiam iu el ili decidas veni sur la teron, kion ili diras al Li? Ili diras al Li, ke Li venu ĉe la plej bona

homo. Kaj nun oni povas demandi min, kiu povas esti la plej bona. — Tiu, kiu havas celon, idealon, la plej altan idealon. Ĉe li, Li venos. Tiu lernanto, kies animo ĉiam vibras, kiu ĉiutage pensas pri sia Instruisto, ĉe li venos la Instruisto. Sed tiun lernanton, kiu pensas pri diversaĵoj, la Instruisto preterpasos lin kaj lian domon, dirante al si: ĉi tie loĝas unu el miaj forgesitaj lernantoj. Sed kiam preterpasos la domon de la unua, Li diras: ĉi tie loĝas unu el la lernantoj, kiun mi devas viziti ĉi-tiun vesperon.

Jen ĉi-tio estas la granda idealo, la alta idealo, kiun vi ĉiuj devas posedi. Ĉion plej belan, plej altan, plej elegantan, plej fortan, plej potencan, plej bonan, plej saĝan, plej justan, plej veraman, ĉion unuagradan! Apliku ĉi-idealon, kaj vi vidos kiel via vivo ŝanĝiĝos. Sed apliko necesas! Iam vi sentas vin afliktita, kaj vi diras: Malplena estas mia koro, forestas la Amo. Kion fari? Diru al si: Morgaŭ mi iros renkonti la sunon kaj penos kapti la unuan radion.

Ĉu vi provis matene vekiĝante kapti vian unuan penson? La Naturo en ĉi rilato estas tre postulema. Kiam vekiĝas iu infano, gi, la Naturo tuj haltiĝas antaŭ ĝi, detenas sian spiradon, kaj atentas pri kio ekpensos ĉi-tiu infano. Se vi vekiĝinte direktas vian penson al Dio, kaj ekpensas pri la Alta Amo, kiu plenigas vian animon per ĉiuj bonaĵoj, ĝi diros: El ĉi-tiu infano granda homo estiĝos!

* * *

## Biblioteko „NOVA KULTURO“

(sub la aranĝo de redakcia komitato)
dum sia unua jaro donos la jenajn numerojn:

1. LA ALTA IDEALO — parolado de la Majstro Petro Dânov, kun Lia portreto kaj antaŭparoloj de Mara Belĉeva kaj de D-ro K. N. Paskalev.
2. LA GRANDA LEĜO — de P. Dânov.
3. KIUJ KAJ KIAJ ESTAS LA BLANKAJ FRATOJ? — de St. Vatralski.
4. LA REVEKIĜO DE LA KOLEKTIVA KONSCIO — de P. Dânov.
5. LA NOVA HOMARO — de P. Dânov.
6. LA UNIVERSA KAJ LA KOSMA AMO — de P. Dânov.
7. LA NOVA VIVO — de P. Dânov.
8. LA MALLARĜA VOJO — de P. Dânov.

9, 10. LA FORTOJ DE LA VIVA NATURO — de Petro Dânov.

**Jarabono:** por Bulgarujo 40 levoj; por fremdlando — 3 sv. fr. aŭ ĉiu egalvaloro. Al varbinto de 5 abonantoj estas sendota unu jarkolekto senpage. Aparta numero 0.40 sv. fr. aŭ egalvaloro.

**Adreso:** Atanas Nikolov, str. „Car Iv. Ŝiŝman“, 19. — Burgas — Bulgarujo.

---

### Preseraroj:

| Paĝo | linio | presite | korektu! |
|---|---|---|---|
| 7 | 11 | maldrandajn | malgrandajn |
| 8 | 15 | eksploras | esploras |
| 9 | 19 | deĝelas | degelas |
| 10 | 28 | abeluloj | abelujoj |
| 10 | 31 | Domon | domon |
| 22 | 35 | malsaga | malsaĝa |
| 23 | 24 | gî | ĝî |

## Biblioteko „NOVA KULTURO“

En la aŭroro de la alproksimiĝanta tago de la ova Kulturo, ni, fruevekiĝintaj infanoj de la nova ivo, faras nian unuan paŝon al la lumradianta ide-o, kiu brilas malproksime antaŭ ni.

Ni estu kerno de la nova vivo, ni estu la grundo kiu ekĝermos la semo de la Nova Kulturo, jen celoj de nia agado. Kaj ni vokas ĉiujn, en kies nimoj brilas la suno de la Alta Idealo, ĉiujn, kiuj speras kaj atendas la grandan Tagon de la Dia egno sur la tero — ni unuiĝu! kaj mano en ano „ni iru la vojon signitan“ al la paciĝita, unu-ita nova homaro.

Por ni ne ekzistas apartaj religioj, or ni ne ekzistas apartaj nacioj, partioj kaj sektoj, — por ni ĉiuj estas fratoj, ĉiuj estas filoj de Dio.

Ni apartenas al neniu sekto, ni amas ĉiujn kaj estimas iliajn opiniojn. La ideojn, kiuj entuziasmi-gas niajn animojn, ni disvastigas ne sentante bezo-non batali kontraŭ kiu ajn. — Ĉar ni al neniu estas malamikoj.

Por subteni nian laboron, ni aranĝis fondon „Nova Kulturo“ invitante ĉiujn simpatianojn sub-teni ĝin. Ĉiu subtenanto de la fondo ricevas sen-page ĉiujn niajn eldonojn.

## Fondo „Nova Kulturo“

| | |
|---|---|
| D-ro Stoicev, Plovdiv | 550 |
| Iv. Gelinov, Sevlievo | 60 |
| D-ro Kadiev, Haskovo | 420 |
| G. Ivanov. vil. Keremitlik | 100 |
| N. Canev, Burgas | 60 |
| Grupo de Burgas | 300 |
| (daŭrigota) bulg. lv. | 1490 |

Esperanto-presejo „Nova Kulturo“ — Sevlievo